



# Normanda Esperanto-Bulteno

BULLETIN TRIMESTRIEL-TRIMONATA BULTENO

Nº 44 (nova serio) - Nº 126a - OKTOBRO 1977

**REDAKTAS:** Sino Pottier 21 allée des Reitelets 76190 YVETÔT.

**Sendu la manuskriptojn antaŭ la:** 10a de februaro - 10a de majo -  
10a de aŭgusto - 10a de novembro.

**Eldonita de:** La ESPERANTO-GRUPOJ de la RUENA REGIONO.

**EKSPEDAS:** Naryse + Pierre Lemarchand 43 rue Desseaux 76100 ROUEN

**UNION des ESPERANTISTES de NORMANDIE:** ccp : 283.40.H. ROUEN

**KOTIZOJ:** Minimuma kotizo : 7,00 Fr. - Subtenkotiĝo ek de 40,00 Fr.

Nura abono al NORMANDA ESPERANTO BULTENO sen membroj: 7,00 Fr.

"La verantoj respondecas pri la enhavo de la subskribitaj artikoloj."

## KUN ĈIUJ POR ESPERANTO

Dum nia lasta ĝenerala kunveno, la ĉeestantoj unanime aprobis la proponon subteni la eksterordinaran varbkampanjon de U.F.E. Ili eĉ decidis financean helpon por ke ĉiu normando - ne membro de U.F.E. - ricevu la oficialan organon de franca unuiĝo. De tiam la rilatoj de nia normanda unuiĝo kun la normanda Federacio de U.F.E. estis ankoraŭ pli bonaj. Ni antaŭvidas la eblecon sendi samentempe la informpaĝojn de la Federacio kun nia propra bulteno. Ankau ni petas ĉiujn partopreni la Zamenhofan tagon en Les Andelys dimanĉe 4 an de Decembro Decembro je la 15a horo.

Cu tio signifas ke ni ŝanĝis nian neŭtralan sintenon rilate al aliaj esperantistoj organizaĵoj kaj ke ni decidis iel favorigi U.F.E. ? Tute ne. Ni repetu ke nia unuiĝo celas regroupigi ĉiujn esperantistojn loĝantajn en Normandio. Ni ne konkurencas la aliajn movadojn sed male provas ilin helpi laŭ bezono kaj laŭ niaj eblecoj. Se por multaj, ni estas la unua ŝtupo, ni deziras ke ili grimpu la aliajn ŝtupojn kaj fariĝu membroj de nacia kaj internacia asocio.

Ĉi tiun jaron, nova vento flugis super U.F.E. Nia unuiĝo decidis favorigi U.F.E. ĉar potenca kaj efika devus estis la neŭtrala nacia movado en nia lando. Sed en aliaj cirkonstancoj kaj per aliaj rimedoj, ni povus eventuale alporti nian helpon por aliaj movadoj.

Helpi ĉiujn kiuj laboras por esperanto restas nia ĉefa strebo.

Nun alvenis la finjara periodo. Nome de la estraro de nia unuiĝo, mi deziras al vi ĝojajn finjarajn festojn !

P. QUILLAUD

## ESTRARA KUNSIDO de U.N.E.

La 24an de Septembro 1977, je la 14horo, okazis en Yvetot ĉe G-roj POTTIER komitkunveno de U.N.E.

S-ro GIBAUZ legis leteron de S-ro BOSCH, kiu dankas U.N.E pro esprimo de simpatio, kaj la komitato diskutis pri la ebleco deponi sur la tombon de S-ro BOSCH memorobjekton nome de U.N.E.

Poste, la ĉeestantoj diskutis pri la problemoj de la bultenoj, ĉar la sindikato, kiu nun presas ĝin, baldaŭ aĉetos novan maŝinon. Oni ankaŭ decidis, ke la lasta paĝo de la venontaj bultenoj povos eventuale enhavi kelkajn franclingvajn artikolojn, aŭ, rezumo de la ĉefaj artikoloj por la Komencantoj.

RILATOJ KUN LA FEDERACIO. Ĉiuj ĉeestantoj montriĝis favoraj al kunlaboro inter U.N.E. kaj LA FEDERACIO, ĉar U.N.E. ĉiam estas preta kelpi ĉiun organizon de laborantoj por Esperanto.

Ni povus ekzemple denove publikigi artikolojn por la Federacio, kiu nur pagus la elspesojn.

Ni povus ankaŭ havi komunajn kunvenojn por diskuti aferojn rilatajn al ambaŭ organizoj, kaj komunajn kongresojn, kun speciala kunveno por diskuti pri la aferoj de U.F.E.

KASRAPORTO. La kaso elspesis 300 Frs por la aŭtuna kampanjo. ZAMENHOF-RENKONTIĜO. Se ni ne trovos taŭgan lokon por trinki la Havra Grupo provos organizi ĝin en Sanvic. S-ro GIBAUZ zorgos pri tio. Ĝi povus okazi la 11an aŭ la 12an de Decembro 1977.

AŬTUNA KAMPANJO. Ni provos vendi laŭeble la biletojn. S-ro POTTIER kolektos la monon kaj la stumpojn.

VENONTA KUNVENO. Ĝi okazos, se eble, kun la Konsilio de la Federacio, la lastan dimanĉon de Novembro, eble en Les Andelys. Ni proponas tiun daton kaj tiun lokon al la Federacio.

## - RIMARKOJ

Post tiu kunveno, montriĝis neeble organizi la Zamenhofan renkontiĝon en Sanvic. Ĉar la Grupo en Les Andelys kutime organizas Zamenhof-Tagon, ni unuiĝos kun ili, la

4an de DECEMBRO, Je la 15an horo, en la Junuldomo de

LES ANDELYS.

Ankaŭ la dato de la venonta estrara kunveno estas ŝanĝita:

Ĝi okazos la 4an de Decembro 1977, je la 10a horo, en la Junuldomo de Les Andelys.

# NIA VIVO EN ...

## LE HAVRE

La Esperanta Grupo en Southampton invitis du membrojn de la Havra Grupo al la celebrado de la 60-jara jubileo de la Suda-Angla Esperanto Asocio.

La Prezidanto de la Havra Grupo, S-ro Gibaux ĉeestis tiun ceremonion kun sia edzino, kaj salutis la Asocion nome de U.N.E. en ĉeesto de la urbestro de SOUTHAMPTON kaj de du parlamentanoj.

=====

## VIRE

Ekde la komenco de Oktobro mi (ree) gvidos esperanto-kurson al tri lernantoj. La kurso okazas ĉiun lundon (je 18h15) en la domo de S-ro Moduviel (radiestezisto) Stato de Colin Vire.

Kun tiuj tri lernantoj mi vizitis Kastelon en Gressillon je la 9a - 10a de Julio. Ilin ĉarmis la etoso de la (plenplena) Kulturdomo, ĝi instigis ilin al plura lernado, ili intencas re-viziti la Doman en la venonta jaro dum unu semajno.

S-ro LEGRET. VIRE.

=====

## CAEN

La dekan de Oktobro 1977, je la 18a, okazis la unua kurso de Esperanto por komencantoj de la nova lerne-jaro.

Krom la instruanto, dek-tri personoj ĉeestis, el kiu tri estis (suporteroj). Do venis dek v<sup>er</sup>aj novuloj: 8 virinoj kaj 2 viroj. 8 ge-junuloj kaj du malpli junaj inoj. Socia medio mezalta: ĝenerale ofististoj aŭ instruistoj. La uzota lernilo estas la asimil-metodo, el kiu dek eksempleroj disvendiĝis.

La kursoj komenciĝis post klasika informo kampanjoj:

- Longa artikolo en la gravega regiona ĵurnalo ("Ouest-France)" de la 6a de Oktobro. Ĝi anoncas ne nur la kursojn de CAEN sed ankaŭ tiujn de Lisieux kaj Trouville.

- Informo en la grava regiona ĵurnalo "Paris Normandie" de la 6a de Oktobro.

- Informo en la tre legata senpage monata ĵurnalo "Le Mois à Caen" de Novembro 1977.

- 40-o da afiŝoj en strategiaj lokoj.

- 4 Esperantaj libroj en la montro fenestro de unu el la plej gravaj vendovendistoj de la urbo dum du semajnoj, kune kun unu afiŝo. (Librairie GUILLAUME: ASSIMIL: QUE SAIS-JE N° 1511, DICTIONNAIRE ALBAULT ET WARLENGHIEN.)

- Versajne informoj en kelkaj el la 8 aliaj informitaj ĵurnaloj, ne kontrolitaj.

- Informo en la bulteno de la Soci-kultura centro kiu ĉirkaŭas la kurson. Tiu bulteno estis senpage disdonita en leter-skatolon de la kvartalo je 1500 eksempleroj.

La sekvantajn lundejn ĉeestis respektive 10, 7, 11 personoj.

# Esperanto en radio



Ĉiujn informojn pri radio bv. sendi al s-ro G. Largantier (redaktoro de ĉi tiu rubriko), 29, Bd. Murat, F-75016 Paris, Francio. En la tabelo, la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon. Aliajn horsistemojn v. en la Jarlibro 1977, p. 66. Mal-longigoj: I = informoj, P = Parolado, K = kurso.

## Ĉiutage

05.00-05.30 Varsovio, 200m (1502 kHz), 75.84m (3955 kHz), 50.04m (5995 kHz), 48.90m (6135 kHz), 41.27m (7270 kHz). I.P. Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Poŝtkesto 46, PL-00950 Warszawa, Pollando.  
15.30-16.00 Varsovio, 41.99m (7145 kHz), 31.45m (9540 kHz), 25.42m (11800 kHz). I.P.  
21.30-22.00 Varsovio, 200m (1502 kHz), 75.84m (3955 kHz), 50.04m (5995 kHz), 41.27m (7270 kHz).

## Dimanĉe

05.45-05.55 Vieno, 48.74m (6155 kHz), aŭ 16.82m (17840 kHz). I.P. ORF Esperanto, Postfach 700, A-1041 Wien, Aŭstrio. Ripeto de la antaŭa sabata programo.  
10.30-10.40 Murtiba, 190m (1580 kHz). I.K. Soc. Em. Radiovox, Murtiba (Bahia), Brazilo.  
11.00-11.30 Pekino, 40m, 30m. I. Radio Pekino, Esperanto-fako, Pekino, Popola Respubliko Ĉinio.  
12.30-13.00 Pekino, 25m, 19m. I.  
20.00-20.20 Romo, 41.24m (7275 kHz), 30.90m (9710 kHz), 25.42m (11800 kHz). P. Radio Roma, Esperanto-Fako, Casella Postale 320, I-00100 Roma, Italio.  
20.05-20.15 Vatikano, 196m (1529 kHz), 48.47m (6190 kHz), 41.38m (7250 kHz), 31.17m (9625 kHz), 31.10m (9645 kHz), 25.63m (11705 kHz), 19.84m (15120 kHz). I.P. Radio-vaticana, Esperanto-fako, Piazza Pia 3, I-00193 Roma, Italio.

## Lunde

00.00-01.00 Sorocaba, 278m (1080 kHz). I.K. Rádio Clube de Sorocaba, rua São Bento 190, BR-18100 Sorocaba, S.P., Brazilo.

18.00-18.10 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz). P. (s-ro A. Saur). Svisa Kurtenda Radio, Esperanto-Fako, CH-3000 Bern 15, Svislando.

## Marde

12.10-12.20 Gdańsk, 66.29 MHz (mod. frekv.). Ripeto, dek tagojn poste, de la sabata programo el Varsovio, unu fojon monate.  
20.30-20.45 Ibra Radio, per ondoj de Radio Mediteranea en Malto: 49.34m (6060 kHz). I. Ibra Radio AB, S-105 36 Stockholm, Svedio.  
21.35-21.45 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz), 31.28m (9590 kHz), 25.60m (11720 kHz), 25.27m (11870 kHz), 19.60m (15305 kHz). Ripeto de la lunda programo.

## Merkrede

18.00-18.10 Berno: ondoj, kiel lunde. P. (s-ro Gacond).  
22.00-22.15 Sabadell, 203m (1475 kHz). I.K. Radio EAJ 20, Sabadell, Hispanio.

## Ĵaŭde

17.50-17.55 Vieno, 203m (1475 kHz). I.  
21.35-21.45 Berno, ripeto de la lunda programo; ondoj, kiel marde.

## Vendredo

12.00-18.10 Berno, ripeto de la merkreda programo per samaj ondoj.  
20.00-20.30 Pekino, 43m, 33m, 31m. I.  
23.05-23.20 Zagrebo, 264m (1163 kHz). P. Radio Zagreb, Esperanto-Fako, Jugoslavio.

## Sabate

00.10-00.20 Varsovio, 1321m (227 kHz). P. Programo preparita de Pola Radio, ul. Ushagena 1, Gdańsk-Wrzeszcz, Pollando: ĝi okazas unu fojon ĉiumonate dum muzika programo.  
11.00-11.30 Pekino, kiel dimanĉe.

12.30-13.00 Pekino, kiel dimanĉe.  
16.45-16.55 Vieno, 48.74m (6155 kHz), 19.86m (15105 kHz). I.P.  
20.00-20.30 Pekino, kiel vendrede.  
21.35-21.45 Berno, ripeto de la merkreda programo; ondoj, kiel marde.  
22.00-22.15 Valencio, 358m (836 kHz). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanio.

**RADIO VARSOVIO**, krom la ĉi-supre anoncita ĉiutage programo, prezentas "Anguleton por esperantistoj": 1) dum la germanlingvaj programoj dimanĉe de la 05.30 ĝis la 06.00 per ondoj 200m, 75m, 49m, 41m; de la 16.30 ĝis la 17.00 per ondoj 49m, 41m; de la 21.00 ĝis la 21.30 per ondoj 49m, 41m; 2) dum la svedlingva programo ĉiun duan mardon de la 16.00 ĝis la 16.30 per ondoj 200m, 75m, 49m, 41m; de la 19.30 ĝis la 20.00 per ondoj 49m, 41m; de la 21.00 ĝis la 21.30 per ondoj 200m, 75m, 49m, 41m; 3) dum la danlingva programo sabate de la 14.30 ĝis la 15.00 kaj de la 19.30 ĝis la 20.00, dimanĉe de la 15.30 ĝis la 16.00 per ondoj 200m, 75m, 49m, 41m.

## ĜENERALA AŬDEBLECO

a) Stacioj nur loke aŭdeblaj (nur en la lando mem, kelkaj nur en la urboj): Murtiba, Sabadell kaj ĉiuj elsendoj per modulita frekvenco.  
b) Stacioj aŭdeblaj en Eŭropo kaj mediteraneaj landoj: Berno (75.28m, 48.66m, 31.46m), Pekino (vesperaj elsendoj vendrede kaj sabate), Romo, Valencio (en la suda Eŭropo), Varsovio, Vatikano (196m, 48.47m, 41.38m, 31.10m), Vieno, Zagrebo, Ibra Radio.  
c) Stacioj aŭdeblaj en Azio kaj Ameriko: Pekino (dimanĉe kaj sabate je la 11.00 kaj 12.30 GMT), Sorocaba (en Brazilo kaj najbaraj landoj).  
ĉ) Stacioj aŭdeblaj en Afriko kaj la orienta parto de Nord-Ameriko: Berno (31.28m, 25.60m, 25.27m, 19.60m), Vatikano (31.17m, 25.63m, 19.84m).

Ekspozicio okazis La 9an kaj la 10an de Oktobro 1977 en la montrofeneŝtro de " Droguerie Legoupil " kaj montris la utilecon de Esperanto en komerco, turismo, personaj kontaktoj, etc;

Pluraj kursoj malfermiĝis por infanoj kaj plenkreskuloj. Entute lernas 5 Komencantoj kaj 4 progresantoj.

La Ĝenerala Kunveno de la grupo okazis la 9an de Novembro kaj konstatis, ke la kursoj kaj ekzamenoj donis tre kontentigajn rezultojn pasintjare ( 4 Atestojn pri Lernado kaj 1 Atesto pri Praktika Lernado), sed la monetaj kunvenoj ne okazis. Por alporti rimedon al tiu bedaŭrinda situacio, oni decidis restarigi ilin ek de venonta pritempo kaj decidiĝis pri la temoj de la 2 unuaj kunvenoj.

Fine oni decidis festi la Komunan tagmanĝon la 10an datrevenon de la oficialiĝo de la grupo. Tiu manĝo, al kiu ĉiuj estas kore invitataj okazos en la restoracio de la Junulardomo la 15an de Januaro 1978, kaj estos sekvata de la tradicia Reĝa Kuko kaj disdono de ludiloj al la infanoj de la Grupanoj.

=====

## KONSILIA KUNVENO DE LA NORMANDA FEDERACIO EN ROUEN.

La konsilio de la Federacio kunvenis ĉe G-roj Lemarchand, la 9an de Oktobro 1977, je la 15a horo.

### ORDIGADO DE LA FEDERACIAJ AFEROJ.

Fraëlino Bonnet zorgos pri la deklaro al la prefektejo pri la nova estraro. S-ro Tailpied okupiĝos pri la adresŝanĝo en la poŝt-ĉekkonto.

RILATOJ KUN U.N.E. Montiĝas dezirinde ke ni havu konstantajn kontaktojn kun U.N.E., kaj ni kunlaboru kun tiu okanizo.

Komunaj estrarkunvenoj povus okazi pli malpli regule, kaj ankaŭ komunaj kongresoj en kiuj la agadraporto de la grupo okazus en komuna kunveno. Ni kunvenos kun la estraro de U.N.E. en Les Andelys pri tio, kaj pri la ebleco publikigi artikolojn en Normanda Esperanto Bulteno, kaj je kiuj kondiĉoj.

TEKIER-KAMPANJO. Diversaj grupoj organizos pri organizis propagand-semajnon, sed multaj personoj ne ŝatas la biletojn "Amikoj de Esperanto", kiujn ili trovas malfacile uzeblaj.

VENONTA KUNVENO. Ĝi povos okazi, kune kun tiu de U.N.E., en LES ANDELYS, la 4a de DECEMBRO 1977. (Anstataŭ 27-II-77) je la 10a horo en la Junuldomo.

STRARKORAKTO. En la pasinta numero de la Bulteno la listo de la konsilianoj de la Federacio estis nekompleta. Bonvolu aldoni al la listo de la membroj la nomon de S-ro ROUSSEAU.

Al S-ro ROUSSEAU ni petas pardonon pro tiu nevola forgeso.



# Quarante pays étaient représentés au 62ème Congrès d'Espéranto

On nous communique : C'est à REYKJAVIK, en Islande, que se sont retrouvés cette année, 1.300 espérantophones de 40 pays. Leur rencontre fut particulièrement honorée par l'assistance du Président de la République Islandaise. Elle le fut aussi par l'intervention en personne du Directeur Général de l'U.N.E.S.C.O. Celui-ci insista lui-même sur le rôle de l'Espéranto qui « à la pensée et aux valeurs spécifiques des peuples, exprimées dans leur propre langue, ajoute une possibilité de communication neutre, unique, facile et inimitable, en commençant — et il

ajouté — à reconnaître aujourd'hui le pluralisme culturel, et la gravité pour la communauté mondiale de défendre la spécificité culturelle de chaque peuple ». Il mettait ainsi en relief la qualité et les avantages de cet instrument admirable qui permet de confronter toutes les cultures, même les plus localisées, sans avoir aucune écrasée ou oubliée.

Notons aussi que la ville de Poitiers a reçu cette année le 33<sup>e</sup> Congrès Mondial des jeunes espérantistes : plus de 300 congressistes, 20 pays représentés, 15 langues maternelles oubliées « l'espace d'un été ». Sans interprète, ils ont échangé leurs sentiments et leurs projets, ils ont travaillé, dansé, excursionné. S'ils ont apprécié nos châteaux et les abbayes poitevines, c'est le cœur de notre littérature moderne qu'ils ont approché lors de la représentation théâtrale de « Justes » d'Albert Camus (présentée en Espéranto par une troupe parisienne). Cette pièce étant absente en traduction, de la majorité des régions linguistiques représentées, c'est une fierté pour les espérantistes français d'avoir contribué à faire connaître ce témoignage d'un de nos Prix Nobel.

Le Groupe Espérantiste du Havre est heureux d'inviter, aux cours qui s'ouvriront prochainement, tous

ceux qui s'intéressent à ce moyen de communication internationale.

Cours 1<sup>re</sup> année à la MJC. Cours pratique 2<sup>e</sup> année au Lycée Porte-Océane. Pour les personnes qui ne peuvent se déplacer, nous rappelons que des cours par correspondance sont organisés par différentes associations, dont l'Union Française pour l'Espéranto : 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004 Paris (Tél. 78.68.86).

En la JUNULDOMO  
de Trouville  
malfermiga E-Kurso  
guidata de S<sup>ro</sup> TALPIED  
ĉiumerkrede je la 20h.  
kun sep komencantoj  
kaj du progresantoj.  
Subtenon por ĉiu !

EL "HAVRE LIBRE"

30 - 9 - 1977

\* LANGUE ESPÉRANTO  
Pour bien voyager,  
apprenez dix langues  
avec... l'Espéranto.

\* Tout homme doit  
savoir deux langues :  
celle de son pays et  
L'ESPÉRANTO

ne forgesu vian jaran kutizon al U.N.E  
7,00 fr. minimum. Dankon !  
c.c.p. : Rouen 283 40 H

Dans les réunions  
INTERNATIONALES  
Une seule langue :  
L'ESPÉRANTO

# ZAMENHOFI RENKONTIĜO

Invititaj de la Esperanto Klubo de Les Andelys, por festi la Zamenhof-Tagon, dimanĉon la 4an de decembro en la Urba Junulcentro, geamikoj el la Havra, Ruena, Ivetota, Pariza kaj nekompreneble Les Andelys - regionoj, ĝuis interesplenan kaj altnivelan posttag-mezon.

Tiun plaĉan varietan kunvenon, ni ŝuldas ĉefe al Familio BONNET kaj al la T.E.S.P.A.-anoj kiuj tiel bele distris nin.

Post kelkaj bonvenigaj vortoj de Sylvie BONNET, Jean Pierre PERRY klarigis al ni la kialojn kaj agadojn de la Teatro ESperantista de PARizo, kin naskiĝis de post iom pli ol unu jaro kaj arigas membrojn de SAT Amikaro, U.F.E. I.F.E.F. (fervejistoj)... kiuj interesiĝas pri teatro. Estas ĉirkaŭ dek geaktoroj kaj laŭ la bezono povas nombri ĝis 15. Krom du profesiaj aktorinoj, ĉiuj laboras, ĉu en oficejo, ĉu havas teknikan okupon. La repertuaro de TESPA konsistas el teatraĵoj originale verkitaĵi aŭ tradukitaĵi. Lastjare en Versailles, kie okazas ĉiun jaron konkurso de lerneja amatora teatro, Sylvie GASPARD prezentis duonhoron de "Andromaka" tradukita de Georges LAGRANGE. TESPA ricevis tiukaze "Specialan mencion por enscenigo kaj prezentado".

Estis, tiam la unua fojo ke la organizantoj de tiu konkurso: T. Maulnier kaj M. Tassen-court, akceptis ke teatra trupo prezentu teatraĵon en la lingvo zamenhofs, tio okazis antaŭ neesperantista publiko kaj ekzamenantaro.

TESPA jam ludis antaŭ esperantista publiko diversloke, eĉ eksterlande en Belgio (Anvers kaj Bruxelles), dua regionaj kaj landaj renkontiĝoj: SAT Amikaraj, U.F.E., kaj Fervoj-istaj kongresoj. Ĉi-jare, ĝi prezentis antaŭ la junulara publiko kaj kongresaro de T.E.J.O en Poitiers la "Justuloj" de Camus.

Venontjare, krom partopreno en la monda SAT kongreso en Lectour (Francio), ĝi ricevis inviton por teatra prezentado en Pollando, interaĝlie en Gdanak.

Ĉi-foje en Les ANDELYS, Michel CAVELAN gitarludis kaj kantis kanzonon de Georges Brassens tradukita de Roger BERNARD "Kanto por la kampul", de Moustaki.: "Malfruas tro;";

Antaŭ la ĉirkaŭ 50 persona publiko, SOLEN', majstre interpretis skeĉon de nia humoristo Raymond SCHWARTZ, poste sekvis triope prezentita kanzono de la franca folkloro:

"Vivu la rozo" fare de Michel CAVELAN Sylvie BONNET kaj Jak LE PUIL.

Tiu lasta kantis en la traduko de LAGRANGE kanzonojn de Béranger, Graeme Allwright kaj la faman "Disertanto" de Boris Vian.

Nia amiko LAGRANGE verve rememorigis al ni la kialon de nia kunveno, nome la Zamenhofa-Tago!

La ĉefa ero de tiu bunta programo estis la teatraĵo de René de Obaldia "La Forpasinto" bonege kaj profesie ludata de SOLEN' kaj Sylvie BONNET.

La brilplena spektaklo finiĝis pere de tipe folkloraj kanzonoj de Aristide Bruant, studentaj kanzonoj de ĉiu konataj kaj de ..... "Nia Normandio"....

Ĉi TESPA -ano ricevis pro tiu altnivela, vere laŭ profesia prezentado, spektaklo, varmajn aplaŭdojn.

Post la kultura flanko, ĉiuj retroviĝis per la bufedo antaŭ allogaj tabloj kaj manĝaĵoj. Estis plezuro revidi, dank'al tiu festeto, malnovajn vizaĝojn kaj konatulojn!

Sino VINCENT, kiu depost kelkaj monatoj loĝas apud Grésillon, nia 25 jaraĝa Kulturdomo, surprizis nin agrable per sia ĉeesto.

Elkorajn dankojn al ĉiuj membroj de la grupo de Les Andelys kaj al la TESPA -anoj por tiu alloga Zamenhofa posttagmezo!

Matene de tiu festa tago, okazis samloke komuna estrarkunveno de la konsilio de la Normanda Federacio de U.F.E., kaj de la estraro de Union des Esperantistes de Normandie. Tiuj du komplementaj kaj memstaraj asocioj interŝanĝis ideojn kaj spertojn por la disvastigo de nia lingvo en Normandie. Raporto sekvas.

Petro Lemarchand.

Ne forgesu sendi al nia Redaktorino Sino POTTIER el Ivetot (vidu la adreson sur la FRONTPAĜO) viajn artikolojn kaj informojn pri la vivo de via grupo. Antaŭdankojn!!

**KIAL FARIGI**

**AMIKO**

**de TESPA**

**"TEATRO  
ESPERANTO  
de  
PARIZO"**



- Ĉar por prezanti al vi spektaklojn, ni bezonas vian helpon !

- Ĉu vi scias ke :

Una teatra kostumo kostas 100 fr.  
Luado de peruko : 120 fr.  
Kvadrat-metro de tolo por dekoroj : 15 fr.  
Speciala farbo : 20 fr. po kilogramo.  
Brulimunigado de la dekoroj : 10 fr. po kvadrat-metro.  
Luado de salono en junuldomo : 500 fr. (Almanah).  
Luado de teatraĵeto 2000 fr. (almanah).  
Impostoj por la "rajtoj de aŭtoreco" : ekde 100 fr. ĝis ..... K.T.P....

- Kaj kiaj estas niaj enspezoj ?

Vendado de la programoj : 100 fr. an iom pli laŭ la nombro de la ĉeestantoj.

Kaj kelkfoje donaceto de la grupo kin petis prezentadon.

- Vi nun scias kial pagi vian kotizon

sed kion pagi ?

- Tri eblecoj :

- Kategorio "A" : AMIKO SIMPATIANTO : 25 fr. minimume.

1<sup>o</sup> "B" : AMIKO HELPPANTO : ekde 50 fr.

2<sup>o</sup> "C" : AMIKO SUBTENANTO : 100 fr. kaj pli...

Ĉiuj amikoj ricevas la bultenon "KULISOJ" kaj senpagan programon de la enirejo de la spektakloj. Amikoj de la kategorio "B" povas aĉeti TESPA-eldonaĵojn kun 20% da rabato, kategorio "C" kun 40%.

Sendu viajn ĉekojn al : TESPA, Sylvie GASPARD, 10 rue Georges Dupont 95870 BEZONS.

## L'ESPERANTO EST-IL UNE LANGUE LITTÉRAIRE ?

PIERRE JANTON,  
professeur d'anglais et d'espéranto à  
l'Université de Clermont-Ferrand, au-  
teur de « L'Espéranto » (Que sais-je).

« La plasticité de la langue a le mérite de pouvoir reproduire dans la traduction en espéranto les effets particuliers à la langue d'origine, et dans certains cas, comme la Kalevala finlandais et quelques scènes de Sha-

kespeare, la traduction espéranto dépasse les meilleures traductions françaises. Les exemples ci-dessous illustrent les ressources expressives de l'espéranto. Le premier texte est une traduction littéraire rigoureuse du poème de Verlaine. Le deuxième et le troisième, œuvres de poètes connus, cherchent surtout à en rendre la beauté dans le registre particulier de l'espéranto.

« Sans entrer dans le détail de la

prosodie, on peut constater sur ces exemples que l'espéranto use avec bonheur du rythme, de la rime, de l'allitération et de l'assonance. Malgré la fixité de l'accent, l'élision permet d'alterner trochées et iambes, anapestes, amphibraques et choriambes. La coloration et la simplicité du vocalisme jointes à la douceur des consonnes lui confèrent une mélodie qui se prête à toutes les techniques oratoires ».

### Chanson d'automne

Les sanglots longs  
Des violons  
De l'automne  
Blessent mon cœur  
D'une langueur  
Monotone.  
Tout suffoquant  
Et blême quand  
Sonne l'heure,  
Je me souviens  
Des jours anciens  
Et je pleure.  
Et je m'en vais  
Au vent mauvais  
Qui m'emporte  
Deçà, delà,  
Par là la  
Feuille morte.

(Verlaine).

### Aŭtuna kantiĉo

La longa plorado  
De la violonoj  
De l'aŭtuno  
Vundadas la koron  
Al mi per langvoro  
Unutona.  
Sufoke premata  
Kaj pala kiam  
Batas horo,  
Mi ree memoras  
La tagojn iamajn  
Kaj mi ploras.  
Kaj mi foriras  
En venton malbonan,  
Kiu pelas  
Ci tien kaj tien  
Min kiel folion  
Flave sekan.

(tr. M. Pagnier).

### Aŭtuna kanto

Dum ĝemo sona  
La violona  
Aŭtuna spir'  
Premiĝas koro  
De monotona  
Sopir'.  
Iĝante pala  
Ĉe la metala  
Horo-sonor'  
De l'rememoro,  
Iras kun ploro  
Mi for.  
La vento blovas  
Kaj for min ŝovas,  
Kaj estas mi  
Kiel falinta  
Kaj flaviginta  
Foli'.

(tr. Grabowski).

### Aŭtuna kanto

La velksezon'  
Per violon'  
Ĝemo sona  
Vundas ĉe l'kor'  
Min per langvor'  
Monotona.  
Sufoke nun  
Kaj pale dum  
Tintoj horaj  
Memoras mi  
Kaj ploras pri  
Tagoj foraj.  
Mi vagas, jen  
Zigzagas en  
Vento forta  
Kun svena fai'  
Simila al  
Branĉo morta.

(tr. Kalocsay).

"EL  
ESPERANTO  
ACTUALITEJ"  
Redakcia de  
U.F.E.